Johann Wolfgang von Goethe,

La violo

tradukita de Manfred Retzlaff

Violo staris sur herbej'
Klinite, en kaŝita ej';
Ĝi estis ĉarma floro.
Jen venis juna paŝtistin',
Leĝere, ne ĝenante sin,
Kaj jen, kaj jen
Kantante paŝis ŝi.

Aĥ, pensis ĝi, se estus mi
Plej bela floro ĉie ĉi,
Aĥ, nur dum momenteto!
Ĝis plukos min la amatin'
Kaj premos min al sia sin'!
Aĥ nur, aĥ nur,
Kvaron-horeton nur!

Sed venis tiam la knabin'
Kaj tute ne atentis ĝin,
Distretis la violon.
Ĝi mortis kaj eĉ ĝojis ĝi:
Mortante tamen estss mi
Per ŝi, per ŝi
Sub ŝi mortanta nun.

Traduko de la Germana poemo "Das Veilchen" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1983-10-12.*

MR-101-2 / Arg-760-1528 (2013-01-05 11:13:48)